

...ĉar ilia estas la regno de la ĉielo...

■ Valentin Melnikov

H.J. Bulthuis. *Malriĉa en spirito*.
95 paĝoj. Fonto, Chapecó, 2015 (2-a eld.)
Prezo ĉe UEA: 4,80 €

Hindrik Jan Bulthuis (1865–1945) estas konata kiel la aŭtoro de la klasikaj romanoj *“Idoj de Orfeo”* (1923), *“Jozef kaj la edzino de Potifar”* (1926), *“La vila mano”* (1928) kaj *“Inferio”* (1938). Malpli konataj estas liaj dramverkoj.

Malriĉa en spirito aperis en 1923 kaj en 2015 estis reeldonita de “Fonto”. La titolo (eble ne tuj komprenata) estas biblia esprimo; en la teksto plurfoje ripetigās la frazo: “Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo”. Diru tion en via nacia lingvo – kaj ĉio klaras. Tamen ŝajne la aŭtoro donas al tiuj vortoj iom alian sencon.

Du ĝemelfratoj, Johano kaj Alberto, estis laboristoj. Sed Johanon trafas akcidento, li falis de alta turo, ricevis cerbdamaĝon, perdis intelekton – sed ne emociojn kaj kapablon (kun)senti. Najbaroj nomas lin idioto – sed la patrino diras: “ne ... vi estas malriĉa en spirito”, kaj legas al li el la biblio. Al li plaĉas la vortoj, li eĉ petas ripeti... li revas veni en la ĉielan regnon, revas vidi Dion.

Alberto intertempe devas soldatiĝi: estas 1812, Napoleono ekmilitas kontraŭ Rusio kaj bezonas multajn soldatojn. Alberto ne volas militi, fuĝas, sed estas kaptita kaj kondamnita al mortpuno. Tamen, kelkajn horojn antaŭ la destinita ekzekuto li venas hejmen por adiaŭi la patrinon kaj la fraton: gardisto, lia plej bona amiko, lasis lin kondiĉe ke li revenos – alikaze oni mortpafos la amikon anstataŭ lin. Dilemo... Meze de la dramo sagaca leganto jam povas prognozi pluajn eventojn, sed la fino estas apenaŭ prognozebla.

Ne estas montrata milito – sed ordinara armea vivo aperas jen ridinde absurda, jen naŭze abomena. Tiurilate



la dramo de Bulthuis ne perdas aktualecon eĉ post cent jaroj, samkiel famaj tiuepokaj verkoj de Hašek kaj Remarque. Milito, armeoj, ĉio ligita kun “laŭleĝa” perforto estas terura aĉaĵo, kaŭzo de ĉiaj homaj malfeliĉoj.

La lingvaĵo certe iom diferencas disde la nuna. “Simplulo” en la senco “stultulo, mens-handikapulo”; la multfoje uzata “fumturo” (t.e. alta fumtubo); sistema skribado de numeraloj kun streko (dudek-kvar, dek-tri ktp.); ie-tie ne-logika vortordo: la eldonejo eĉ avertas: “atentu pri la mislokita “ankaŭ”, se oni ludos la teatraĵon”. Tamen interese sonas: “interfingrigas la manojn”; “mi brogos kafon”.

Preseraroj ne multas, sed okulfrapas. Eĉ sur la kovrilpaĝo legeblas: “Tetraĵo” (vidu la kovrilbildon en iu libroservo). Nu, tiurilate la libro ne unikas: mi konas almenaŭ du librojn en Esperanto kun preseraroj sur la kovrilo...

La temo pri fieco de ĉiuj militoj eternas, precipe en Esperanto. Tiu pri rilato al “malriĉaj en spirito” tre populariĝis lastatempe. Do la teatraĵo de H. J. Bulthuis meritis reeldonon kaj eĉ eventualan sursceniĝon.

Rakontaro de Genĝi – aĉetu ĉe la libroservo de UEA:
<https://katalogo.uea.org/?inf=9847>

Rakontaro de Genĝi, Parto I. Sinjorino Murasaki (Murasaki Ŝikibu),
Prozo tradukita, Belmonto, 2020. La unua volumo (el kvar) de ĉefverko de la frua japana literaturo kaj unu el la unuaj romanoj en la mondo (11a jc).

Akademio Literatura de Esperanto prezentis ĝin:
<https://www.akademio-literatura.org/arkivoj/433>

